

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1971 **3 - 4**

KULTURAJ KAJEROJ

1971 MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represajo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Tunizio inter pasinteco kaj estonteco

La Plantoj kiuj moviĝas

Naskiĝo de la Arto H. Röllinger

La unua mensogo L. Tihanyi

Poemoj L. Blaga

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Ekzistas insektoj kaj bestoj, kiuj dum la somero plenigas siajn « subtegmentejojn » per manĝaĵoj por la vintro kaj riparas sian loĝejon. Kontraŭe Grésillon ripariĝas kaj pleniĝas dum la vintro kaj la printempo por la somero. La lignaĵisto, la plumbisto, la gipsisto, la masonisto malkonstruas kaj rekonstruas. Amikoj farbas kaj surgluas murpaperon. Mebloj alvenas. Provianto amasiĝas. La 3-an de julio ĉio estos preta por akcepti la gerestadantojn, kiuj ne vidos kiom da laboro, da streĉado antaŭis ilian alvenon. Ĉar ĉio aperas natura al kiu ĝuas sian restadon. Nur la geamikoj, kiuj regule venas al la kastelo konstatas la iom-post-ioman modernigon.

Pli videblaj, eble, estas la ŝanĝiĝoj en la parko. Kiam malaperas arbo mortinta aŭ faligita de ventego, mankas io en la pejzaĝo. Kaj la juna arbo ĵus plantita, ankoraŭ modesta kaj timema, pruvas, ke oni pensas pri la estonteco. Ili estas multaj tiuj malaltaj arboj, tiuj arbetoj, kiuj jaron post jaro alportos plian ĝuon al la rigardo. Ĝenerala plano de pliriĉigo de la parka vegetaĵaro estis farita de nia amiko Pierre Métivier, hortikulturisto. Jam ĉijare li komencis la plantadon laŭ la plano farita. Ni povas konjekti, ke post kvar, kvin jaroj la pejzaĝo estos ankoraŭ pli agrabla ol nun. Ĉar nia celo estas pli kaj pli agrabligi la restadon de la gesamideanoj ne nur en la kastelo sed ankaŭ en la ĉirkaŭaĵo. Kio pli plezurigas la koron de esperantisto ol akceptado en plej verda Esperantujo ?

10-a paska kultura semajno en Gresillon

La 10-a Paska Kultura Semajno okazis de la 3-a ĝis la 9-a de aprilo 1971 en la kastelo de Grésillon, apud Baugé (Francujo).

20 stipendiuloj, studentoj de la Beletraj Fakultatoj de Aix-en-Provence kaj Clermont-Ferrand ; 20 gelernantoj de liceoj kaj kolegioj ; 30 plenkreskuloj partoprenis tiun semajnon. Japanino, du germanoj, anglo kaj dano ĉeestis ankaŭ la staĝon.

Profesoro Pierre Janton, kiu iniciatis en 1969 la kursojn de esperanto ĉe la Fakultato de Clermont-Ferrand kun atribuo de poentoj al la universitata diplomo pri lingvaj studoj, ne nur ĉeestis sed ankaŭ prelegis pri « Esperanto kaj angla lingvo ». Li konkludis je la fiasko de la studo de la fremdaj lingvoj post 7 jaroj da studado, kaj deklaris de la sola solvo por la internaciaj rilatoj estas esperanto.

Radio, televido, gazetaro raportis pri tiu 10-a Paska Kultura Semajno kun interesaj intervjuoj de P-ro Janton.

F-ino Muriel Benazet, S-roj Pierre Babin, André Ribot, Jack Rousseau, Jean Thierry, Gaston Turin prelegis ; S-ino Cheverry zorgis pri la ekskurso « de malnova al plej moderna tapetarto » en la fortika mezepoka kastelo de Angers ; S-roj Ribot kaj Turin gvidis la pedagogian parton de la staĝo ; S-ro René Llech-Walter, Honora Prezidanto de U.F.E. estis la administra direktoro.

Esperanto tra la Mondo ★

LA UNIVERSALA KONGRESO EN LONDONO

— 10 fakuloj prelegos por la 24a sesio de la Internacia Somera Universitato. La rektoro estos Profesoro Lionel Elvin, direktoro de la Instituto de Edukado en la Universitato de Londono.

— Por la fruaj alvenontoj, la londona Esperanto-Klubo aranĝos bonvenigan vesperon Vendrede, la 30an de Julio, en la kunvenejo 153, Drummond Street, je kelkaj minutoj de la kongresejo.

— La partoprenantoj povos ĉeesti 30 fakajn kaj specialigitajn kunvenojn.

LA S.A.T. KONGRESO EN PARIZO

— La solena malfermo de la kongreso okazos Dimanĉon la 1an de Aŭgusto en la granda amfiteatro de la « Sorbonne ».

— La laborkunsidoj, prezentado de filmoj, prelego de Kdo Waringhien, ktp, okazos en amfiteatro de la sciencofakultato de Orsay.

EN KUBO

En Kubo, post la fondo de « Komisiono de la lingvo Esperanto » fare de la ministerio pri edukado, oni nun oficiale planas eldoni en la internacia lingvo politikajn librojn kaj revuojn.

T.V. — KURSO EKDE JANUARO EN NEDERLANDO

La televida esperanto-kurso de la institucio TELEAC komenciĝos en la nederlanda televido en venonta januaro.

La ĉefaj aktoroj de la kurso estos du konataj nederlandaj komediistoj.

La tuta kurso konsistos el ĉirkaŭ 20 duonhoraj lecionoj, el kiuj ĉiu prezentiĝos dufoje en la semajno. Aparta enkonduko aŭ reklama leciono estos elsendita en Decembro. La kurso estos ankaŭ spektebla por kolora televido.

MODELA INFORMADO EN POLLANDO

Pola Esperanto-Asocio sendas du fojojn monate bultenojn de « gazetara servo » al proksimume 150 jurnaloj kaj semajnrevuoj. Sekve de tiu agado, pluraj miloj da informpetoj alvenis en P.E.A.

GERMANAJ LERNEJOJ EKSPERIMENTOS PRI ESPERANTO

La organizo de Esperanto-instruistoj en la okcidentgermana ŝtato Nordrejn-Vestfalio anoncis, ke la ŝtata kulturministro aprobis la proponon, eksperimente instrui la internacian lingvon Esperanto en elektotaj lernejoj por kompari la rezultojn de tiu instruado kun la rezultoj de instruado pri la kutimaj fremdaj lingvoj. Oni antaŭvidas, ke la eksperimento komenciĝos aŭtune de 1972.

SEMINARIO « LINGVO KAJ KULTURO »

Ni jam anoncis tiun interesan aranĝon kiu okazos en Strasburgo (Francujo) de la 5a ĝis la 12a de Septembro por interesataj personoj, speciale gejunuloj, esperantistoj aŭ ne. Informpetojn al Claude Nourmont, 8, rue des Frères-Lumières, F - 77 MELUN, Francujo.

POLA ESPERANTO-TEATRO FONDIĜIS

Ĝiaj celoj : kreskigi la prestiĝon de la internacia lingvo ; kontribui al interŝanĝo de kulturaj valoroj. Ĝi estis fondita de du konataj teatraj kaj filmaj geaktoroj.

SE VI INTERESIĜAS PRI REDAKTADO DE SPORTA VORTARO...

....Vi povas rilati kun Sro Ujlaky-Nagy Tibor, Vasarhelyi P.u. 12 Budapest XI, Hungarujo kiu nuntempe laboras pri la vortaro de la 30 plej gravaj sportbranĉoj.

LA « PRAKTIKO » NE PLU APERAS...

Pro la malbona financa stato de « La Praktiko » kaj ĉar la redaktoro ne plu povis daŭrigi la laboron, la estraro de U.E.A. decidis ĉesigi la eldonadon de tiu bone konata revuo, ĉefe destinita al komencantoj. Specialaj paĝoj aperos estonte por ili en la gazeto « Esperanto ». Estus verŝajne utile ke, en ĉiu lando, aperu speciala bulteno dulingva por la komencantoj, kiel tio ekzistas por diversaj lingvoj.

NIA LITERATURO

— « Estiĝo de la tero kaj de la homo » de Leander Tell.

— « La Tempesto » de Shakespeare (Traduko de Kalocsay).

— « Senĝenaj dialogoj » de Alberto Fernandez (tekstoj « babile » prezentitaj pri fiziko, biologio, kaj evoluismo, kiuj unue aperis en « Homo kaj kosmo »).

— « Vole... nevole » de Raymond Schwartz, en luksa eldono (temas pri la noveloj de tiu unuaranga aŭtoro).

— « Libero kaj amo » de Sandor Petofi (poemkolekto de la klasika hungara poeto, tradukita de Kalocsay).

— « La Struvelpetro » traduko de la germana infanlibro « Struwwelpeter » de Heinrith Hoffman.

— « Humoroj » la kvara poemlibro de William Auld.

— Por la francoj : « Vocabulaire Esperanto » (laŭtema) de M. Duc Goninaz.

ĈE ADRIATIKO : LA SOMERUMEJO PRIMOŜTEN

En Jugoslavio, ĉe la bordo de Adriatiko, la somerumejo de Primoŝten akceptas depost dek jaroj la esperantistojn de ĉiuj landoj, por ravaj ferioj... kun vere malaltaj prezoj. Skribu por informo al « Internacia Esperanto-Somerumejo » Primoŝten, kod Sibenika, Jugoslavio.

Tunizio inter pasinteco kaj estonteco

Libertempoj sub suno, hoteloj modernaj, pasloĝejoj kun rustika komforto, pompaj ruinajoj, sorĉantaj oazoj, jen kion Tunizio proponas al la dumvintraj turistoj, kiuj sopiras pri iom da varmo, en tiu sezono, kiam eĉ la suno estas malvarma.

Trans la Mediteraneo komenciĝas aventuro en la nekutimeco ; tie estas mondo, kiu tute malsimilas la nian ; pli ol lingvo kaj pejzaĝo estas la tieaj kutimoj, kiuj transportas nin en alian mondon. Dum Tunizio vekiĝas al la moderna vivo, ĝi tamen restas profunde fidela al siaj multjarcentaj tradicioj, kies ritmo kaj kontinueco plej harmonias kun ĝi.

Ne plu estas Oriento : ankoraŭ ne estas Okcidento (krom en kelkaj stratoj kaj en kelkaj hoteloj, kiuj multiĝas ĉe la marbordoj). Tunizio restas senŝanĝa : tero de transiro, tero de invadoj : tie plej pompaj civilizacioj kreiĝis kaj ruiniĝis, forlasante malantaŭ si svagan nostalgion pri tiu malaperinta grandeco kaj pri la revo fidanta je venonta prospero.

Tiu, kiu ŝatas nur plaĝon, akvon kaj sablon, povas perdiĝi en ĝiaj ripozigaj marbordoj. Por la aliaj, tiuj, kiuj havas ankoraŭ en kapo siajn lernolibrojn, Tunizio malfermiĝas kiel glosaro de antikva lingvaĵo kun fortaj bildoj. La eŭropaj kvartaloj de Tunizio tro similas la niajn por ke ni deziru tie longe restadi.

La vojaĝo komenciĝas sub la voltitaj stratetoj, kie, « souk » - oj, odoroj kaj bruoj elvokas la foirejojn de « Mil kaj Unu Noktoj ». En Tunizo, la ĉefurbo, pasinteco renkontiĝas kun estonteco. Tie bolas tiom da diversaj aktivaĵoj, ke vertiĝo prenas nin.

Tra la svarmantaj kaj zigzagaj stratetoj de la « Medina » oni vane provus orientiĝi ; kun iom da malkvieteco oni klopodas foriri por retrovi la sunon.

Romo-postrestaĵoj


En Bardo, roma vivo ankoraŭ ĉeestas : palacoj, kazernoj estas nun muzeoj, kiuj entenas mozaikojn kaj Kartagenajn steleojn. Sur la muroj, la mozaikoj, ĉarmaj kaj naivaj bildoj, rakontas la tiaman ĉiutagan vivon : sablo-koloro, delikata verdo dolĉe vivigas ŝipojn, ĉasistojn, fiŝkaptistojn, farmojn, virinojn kaj diojn. De la antikva Kartago restas nur kelkaj disigitaj spuroj, ofte enterigitaj sub novaj domoj. La fama urbo, kreita de Didon, Reĝino de Tyr, ne plu estas. Banlokoj, luksaj vilaoj, modernaj hoteloj anstataŭis la ĝardenojn de tiu tiama « nova ĉefurbo », kiu dum 6 jarcentoj regis la merkatojn en Mediteraneo. Nur, de ia teatro, restas kelkaj kolonoj ; la haveno, en kiu tiom multe da galeroj haltis, hodiaŭ estas nur marĉa lageto : nivele de grundo, tie kaj ĉi tie aperas kelkaj muroj el brikoj, cementitaj per roma cemento.

Apud la maro, nur la Antonin-termoj kun ĝiaj grandegaj koridoroj ruinigitaj kaj ĝiaj ciklopaj kapiteloj permesas imagi la luksegon de tiu popolo de gigantoj ; ĉirkaŭe oni arigis kelkajn statuojn kaj funebrajn steleojn.

En Salambô, la « Tofet de Tanit », sanktejo de tiu diino, kiu samparte kun Baal ricevis la fervorojn de la Kartaga popolo, similas ĝardenon. Sub la hederoj oni puŝas kradon : vojeto serpentumas inter la geranioj... kaj oni komprenas : en abismo oni retrovis la altaron sur kiu, dum jarcentoj, oni oferbuĉis la unuenaskitojn de la nobelaj familioj. Miloj da etaj urnoj entenas la gracilajn ostojn : oni elterigis la urnojn kaj ilin vicigis.

Aliloke la roma civilizacio lasis restaĵojn pli spektindajn. Por la turistoj revantaj pri Antikveco jen la subteraj vilaoj de Bulla Regia, la temploj de Dougga, la ruĝa amfiteatro d'El-Diem superstaranta la araban urbeton, kiu premiĝas ĉirkaŭ ĝi. Tiu monstro, kvankam ruiniĝinta, ankoraŭ timigas : en ĝiaj malbumaj koridoroj, en ĝiaj karceroj, en ĝiaj kavernaĉoj, leonoj kaj kaptitoj kune malsategis.

Rilate Sbeïtla-n oni tiom multe uzis ĝin kiel ŝtonminon, ke rare estas trovi vertikalan muron. Tamen oni povas rekoni la stratojn de tiu grandega urbo, la nenombreblajn domojn la termojn, la teatrojn, la bizantajn bazilikojn, aŭ la kristanajn baptejojn kovritajn je mozaikoj.



Vespere, kiam la infanoj, tie ekskursantaj kantas kalkulkanzonon, la Forum-Placo retrovas gajan aktivecon. Neatendite estas konstati, ke en Kairouan, la araba sankta urbo, Roma arto pleje ankoraŭ vivas. La konkeranto Ukba Ibn Nafi fondis Kairouan en 670 : eĉ la plej malgranda detalo estis konstruita pere de luksegaj ŝtonoj kaj oni povas aserti, ke la Preĝo-Ĉambro de la Granda Moskeo posedas la plej belan kolektadon da romaj kolo-


noj kaj kapiteloj nenie ol ĉi tie kunigitaj. La Granda Moskeo entenas arbarojn da kolonoj kaj ankaŭ putojn, kies put-muroj estas eluzitaj pro jarcentoj da ritaj sinlavoj. El la supro de la minareto, ŝajnas al ni, ke la blanka urbo kun siaj kupoloj kaj sia stratlabirinto premiĝas, timante la ĉirkaŭantan dezerton, en kiu ĝi estis perforte emplantita, malgraŭ ĉiu logiko.

Eden-ĝardeno

Sep vojaĝoj al Kairouan la Sankta valoras pilgrimadon al Mekko. Tial ĝiaj moskeoj estas plej kultindaj, kaj en ilin oni eniras ĉiam kun respekto. La blankaj kupoloj de la sanktejoj apenaŭ ondadas sur la horizonto, kie malalte profiligas la senmakulaj tegmentaj terasoj ; ĉe la muroj la floroj disfloras en terpotoj pendigitaj laŭ geometriaj motivoj. En la souk-oj, vendistoj kaj manlaboristoj kliniĝas sur dolĉaj tapiŝoj el sablo-kolora kaj bruna lano. Rigardante la grandan blankan kamelon, kiu, paŝe kuntrenas la grandan radon de puto, ni sentas nin en ia antaŭa jarcento.

Senfinaj vojoj serpentumas en la dezertaj teroj : neniam la pejzaĝo montras fortajn kontrastojn : nur la lastaj ondoj de Atlas, kiu tie finiĝas, montras, al nordo, spronojn kaj rokajn marbordojn.

Aliloke la ebenaĵoj estas senlimaj kaj perdiĝas ĉe la ĉielo ; estas nur post ŝtonvastaĵoj tie kaj ĉi tie punktitaj de la malaltaj nomadaj tendoj, ke floras la oazaj pal-



maroj, kvazaŭaj melankoliaj bukedoj, de Gabès, Gafsa, Tozeur, Nefta. Gabès, Gafsa, Tozeur aŭ Nefta ? ne gravas ! ĉie la sorĉaĵo estas la sama. Mirigaj popoloj tie vivas de jarcentoj kun sama simpleco kaj sama filozofio.

La kamelo kun sia mokema balancado regas kiel mastro. La virinoj estas vestitaj je pompaj ĉifonaĵoj, kie purpuro, violbluo kaj ruĝo miksiĝas en fantastajn harmoniojn. La plej simpla viro marŝas kiel suvereno kaj la okuloj de la infanoj montras nekutiman gajecon. La Oazo ? Estas Eden-ĝardeno : ĉirkaŭ la fontoj, kiuj, mirakle, ŝprucas, la palmoj kuniĝas en korbon.

La grundo, bone akvumita, produktas legomajn kulturaĵojn ; abrikotarboj, bananujoj donas la fruktojn. Per siaj funelformaj floroj la hibiskoj gajigas la ombron. Super, kiel tegmento, la palmoj ŝutas la freŝecon kaj ankaŭ la riĉecon de siaj datoj.

Ĉe la fino de l'mondo

Sed tuj kiam la akvo alvenas fine de la lasta kanaleto sekeco denove triumfas kaj malfekundeco, kaj angoroj... Ĉe la limo de Nefta-oazo estas salita lago ; sekigita ; ĝi kreas maltrankviligantajn miraĝojn. La dezerto ĝis la horizonto tiel vastiĝas ke niaj okuloj ĝin vestas, sur la fora malproksimo, per franĝo da kvietigantaj arboj.

La vilaĝo konstruita el brikoj kneditaj el la tiea tero miksiĝas kun la koloro de l'sablo. En Tozeur la muroj estas reliefe ellaboritaj kaj la suno kaj ombroj ludas kun tiuj geometriaj desegnoj. Ĉie la domoj enfermas kortojn en kiuj kokoj, katoj, infanoj kaj virinoj komune vivas sur la batita tero.

La krepusko, per sia freŝeco kaj siaj nuancoj alportas trankviligon. Tiam la viroj eliras el la palmejo, antaŭenpuŝante obstinajn azenojn. Apud la fonto, atendante la preĝ-horon, ili babilas, sin banas kaj per ĵetkuboj ludas. La knabinetoj, kun ŝuaĉoj, kuras sur la stratoj : scivolemaj ili nin rigardas, faras kelkajn demandojn kaj ridas ĉar ili sukcesis interŝanĝi kun ni nur 2-3 vortojn en la sama lingvo.

Ĉi tie ni estas ĉe la fino de nia vojaĝo, kvazaŭ ni estus ĉe la fino de l'mondo... estas nur la fino de nia propra mondo. Certe Tunizio estas ankoraŭ io alia. Superŝutita de suno, ĝi proponas al ni varmon dum la malbonaj vintraj tagoj ; ĝi konscience ekipiĝas por ricevi turistojn. Vastaj blankaj hoteloj amerikigitaj, « sofistikitaj » kaj normigita kuirado permesas eviti ĉian malagrablan surprizon. Sed la turisto restas iom tro ekster la etniaj relalajoj. Kvankam ankoraŭ nesufiĉe preparita por la individua turismo, Tunizio tamen proponas kelkajn pasloĝejojn kun rustika komforto, kiu permesas pli intime eniri en la ĉi tiean vivon. Por pli bone ĝin koni ni rigardu la potistojn de Nabeul kaj eĉ la infanojn, kiuj jam fabrikas mirigajn ter-objektojn : ni admiru la junulinojn, kiuj teksas berberajn kovrilojn kun vivkoloraj desegnoj, XVIII-jarcentajn « verdaĵojn » laŭ Aubusson-modeloj ; ni ĵetu moneron por la plonĝ-virtuozoj, kiuj de supre de palmo sin ĵetas en la romajn naĝejojn de Gafsa por ĝin rekuperi ; ni rigardu la luletantajn karavanojn, kiuj, laŭlonge de la vojoj, lente pasas ; ni gapu en ĉiu foirejo ; ni manĝu la freŝajn migdalojn ; ni respiru la venton de l'sabloj ; ni meditu en moskeoj.

La kvarono de la loĝantaro havas malpli ol 10 jarojn ; la duono malpli ol 25 jarojn. Tiu pliigo de la loĝantaro, kiu certe pli kaj pli grandiĝas, kondukas al rapida modernigo. Tamen la masonistoj, kiam ili refaras XI-jarcentan muron, ankoraŭ laboras per samaj antikvaj rimedoj ; en la oazoj, lime de la dezertoj, la ritmo de la vivo, la filozofio, la kutimoj restas senŝanĝaj.

Certe, morgaŭ, Tunizio estos ĉe bordo de nova destino. Sed, hodiaŭ, ĝi estas ankoraŭ reala, kelkfoje emociiga ; ĝi ne detruas la revojn de la vojaĝanto, tiu modesta aventuristo de nia nuntempo.

La Plantoj, kiuj moviĝas

Senmoveco ne estas kutima al plantoj. Fakte la plantoj vivas, moviĝas, orientiĝas, translokiĝas, marŝas aŭ rampas. La mistera universo de la vegetaloj entenas embrion de inteligenteco.

Ni konsideras la plantojn, kiel vivantajn estaĵojn, fiksajn ĉe preciza grundo-punkto kaj senmovaj, opozicie al la bestoj, kiuj povas translokiĝi.

Tiu aserto ne estas akceptita de ĉiuj fakistoj. Efektive estas plantoj, kiuj povas moviĝi ; la plej multo el la vegetaloj, dank'al ĉeesto de ege sensivaj ĉeloj reakcias ĉe lumaj influoj. Aliaj reagas ĉe ventoblovetoj, ĉe plej leĝeraj aeretoj, ĉe humideco de la aero (t.e. geotropismo), ĉe la geografia karaktero de la loko kie ili vivas. Eĉ kelkaj estas sensivaj ĉe la magnetaj teraj radiadoj (telurismo) ; ĉe la kosmaj kaj aliaj radiadoj el la Spaco. Fine kelkaj povas ne nur laŭvole orientiĝi, movi ian ajn parton de sia aer-aparato, sed ili povas vere translokiĝi sur la grundo, certe malmulte sed nerefuteble.

La transmigraj likenoj

Ni ne parolos pri virusoj kaj bakterioj rigardataj kiel vegetaloj, kies movkapableco estas enorma kompare kun ilia volumeno (sendube tiu movkapableco estas la plej granda en la tuta vivanta mondo) nek pri diatomeoj : algoj ege moviĝemaj, certe tre proksimaj de la besta regno.

Ni konsideru la likenoj, tiujn hibridajn estaĵojn : ili estas rezulto de konveneca edziĝo pli malpli intima inter algo kaj fungo.



La nederlanda fama botanisto, K.B. Boedyn unue rimarkis, ke la fungo translokiĝis kun la algo, ĝia portilo, laŭ orientado kaj bonvolo de sia gasto. Poste, ĉe la likenoj « Biatorella resinae » vivantaj sur la rezino-larmoj de koniferoj, li observis, ke la likeno nutris sin per la sukeraj elementoj de tiuj rezinoj ; kiam la sukero-rezervo estas elĉerpita, la du kunuloj ambaŭe rampas iom pli malproksimen ; la translokiĝo povas atingi potage 1 mm., tio, kio estas rimarkinda, kiam oni scias ke ĉiu « Biatorella rezinae » havas diametron je 2 mm. ; ĝi integriĝas en grupo de kelkaj dekoj da samuloj, kiuj disiĝas kaj disiras laŭ aparta humoro de ĉiu.

Aliaj likenoj, ekz. : la « Cladonia rangiferina », kiu estas frandaĵo por la boacoj, aŭ la tropikaj « Pannaria mariana » translokiĝas sur la etetaj protoplasmaj tuberoj de la tegaĵo-ĉeloj ; ili marŝas, kiel vegetalaj miriapodoj por trovi sur trunkoj kaj rokoj laŭ la sezono kaj la stato de la ĉirkaŭanta vegetalaro, plej maksimumajn kondiĉojn por pluvivi.

Horloĝo-plantoj

Vi promenas en kamparo ; pro la nebulo vi ne plu konscias pri tempo kaj loko. Vi perdiĝis ! Tute ne, se vi ŝance troviĝas en regiono (precipe en orienta Eŭropo kaj eĉ en ia ajn mezvarma lando), en kiu oni kultivas la Sunfloron (Helianthus annuus). Tiu alta planto kutimas orienti siajn florburĝonojn kaj siajn plene florantajn florojn rigarde al suno. Kaj eĉ kiam densaj nuboj kaŝas la astron. La ĉeloj de la Sunfloro estas sentivaj je la ultraviolaj radioj de la suna radiado, kiuj trairas la nubojn. Rusaj sciencistoj mezuris la precizecon de tiu movo, en unu-hektara kampo plantita je sunfloroj : por la du floroj plej multe kontraŭe starantaj, ili konstatis, ke la diferenco inter ilia propra orientado ekzakte korespondas al la diferenco inter latitudo kaj longitudo de ĉiu el la du flor-punktoj.

La orientado al taga suno de tiu planto estas pli preciza ol niaj plej perfektigitaj astronomiaj lornoj. La 150 varioj de heliotropoj (el la greko lingvo heliotropion = kiu turniĝas al suno) normale dispartigitaj en aŭstralaj, tropikaj kaj mezvarmaj zonoj havas saman econ.

Por ĉiuj gustoj

Elmeksikia herbaco « Mirabilis jalapa » malfermas siajn florojn nur vespere ; nomita « Nokto-Belulino » en mezvarma Eŭropo, ĝi estas baptita la

« 4-a-horo-planto » en Indozenio ; tiu malsameco ĉe la nomo estas okazigita de la diferenco inter la horzonoj ; do, en Javo estas la 4-a posttagmeze, ke tiu floro plene disvolvas siajn petalojn, ĵus kiam okazas la ĉiutagaj ekvatoraj fulmotondroj ; ĝi restas plene florinta ĝis la tagiĝo kaj dume tute logas la insektojn. Kontraŭe la « Tago-Belulinoj » akurate obeas la tagan lumon. Inter tiuj du ekstremoj estas plantoj, kiuj vekiĝas je unu, du, kvar, aŭ kvin horoj antaŭ la sunleviĝo kaj same endormiĝas antaŭ la sunsubiro.

Ordo kaj ordigo

La krokusoj (crocus vernus kaj aliaj varoj) zorge refaldas siajn petalojn, kiam pluvas ; same ĉe krepusko post zorga nokto-tualeto : dank'al movoj de siaj cilioj ili skuas la polenon falintan de la stamenoj en la korolon.

Larĝe sternitaj dum la tago la etaj mimozo-folioj



fermiĝas kiel libro por la nokto ; kontraŭe la akaciofolioj malsupren faldiĝas. Pli miriga estas la trifofolio ; tuj de la vespero la 2 lateraj partoj de la folio faldiĝas unu sur la alia dum la 3-a parto, kvazaŭa protektanta tegmento kliniĝas por ilin ŝirmi kontraŭ nokta malvarmo, roso, kaj lunaj radiadoj.

La scioplenaj plantoj

Estas moviĝemaj algo-sporoj kapablaj distingi en akvo la temperaturo-fluojn kaj ankaŭ antaŭvidi la ŝtormoj por ŝanĝoj ĉe la aerpremo. Tiam ili profunden mergiĝas por eviti la fortajn skuojn de la ondoj. Aliaj algoj fuĝas pro la tro fortaj magnetaj radiadoj ; tion konstatis amerikaj kaj japanaj sciencistoj en la akvo de Bikini kaj Nagazaki-golfo. En Andoj kaj en Centra Siberio, pro ĉeesto de « buloj » de erce-pura fero, pro ĉeesto de meteorŝtonoj aŭ por iu ajn kaŭzo okazas « inversiĝo » ĉe tera magnetismo kaj teluraj anomalioj. Tie oni konstatis, ke kelkaj azaleoj, rododendroj kaj aliaj mont-plantoj modifas la direkton de siaj branĉoj, folioj kaj floroj, laŭ la varioj de la magnetaj intenseco kaj orientado ; tiagrade ke la geologoj, kiuj hodiaŭ serĉas tiujn « inversiĝo-poŝojn » baziĝas, antaŭ ol observi siajn instrumentojn, sur la kondutado de tiuj « scioplenaj » plantoj. Identan almovan fenomenon de ĉela sensebleco oni trovas ĉe spiraletoj (de vito, briono, k.t.p.), kiuj direktiĝas al portilo, kelkfoje sufiĉe malproksima kaj kies volvado-direkto varias laŭ la hemisfero. Vegetaloj nune aperas al ni kiel kompletaj estaĵoj, multe pli kompleksaj ol niaj antaŭuloj opiniis. Ilia movebleco implicas nervan organismon, do inteligenteco-embrion.

El revuo « Rustica »

Estas glando, kiu okazigas movon ĉe la plantoj

S-ro Gaillochet, botanikisto en Poitiers-Fakultato, studis movojn ĉe amerika legumenaco, parenca je fazeoloj : la « Cassia Fasciculata ».

La folioj de tiu planto, konsistanta el folietoj fermiĝas ĉe obskureco kaj malfermiĝas sub lumo.

Mekanika stimulado okazigas kliniĝon de la petioloj — tiuj tigetoj, kiuj fiksas la foliojn sur la centra tigo — kaj fermiĝon de la folietoj. Tiuj « Cassia »-folioj enhavas « petiolan glandon », lokitan sur la interna flanko de la petiolo.

Tiu glando, kupulo-forma, sekrecias blanketan, siropecan substancon.

La eksperimentoj de S-ro Gaillochet montris, ke tiu glando estas responsa je tiuj movoj. Cele al tiu demonstrado, li forigis glandojn sur kelkajn foliojn kaj komparis ties sintenadon kun tiu de la normalaj folioj.

La petiola glando rapidigas la fermiĝon de la folietoj, precipe kiam ĝia sekrecio estas abunda.

Fakte tiu glando estas foto-reflektilo sensebla je lumo ; ĝia agmaniero estas ankoraŭ mistera ; eble estas ankaŭ interna sekrecio.

Ĉiuokaze la laboroj de S-ro Gaillochet, por la unua fojo montras, ke ĉe vegetaloj, ekzistas glando kapabla okazigi movojn ĉe plantoj.


NASKIĜO DE LA ARTO

Depost 2 000 jaroj la homo esploradas tiun sian mondon, en kiu li vivas. Rilate la esploron pri « si mem », pri sia propra deveno, origino kaj sia historio li ne urĝis...

En 1856 en la valo de Neander (Neandertal ĉe Düsseldorf - Germanio) oni trovis hazarde ostaĵojn, laŭ la formoj strange aspektantajn - ĉu prahomaj ?


La fakaj sciencistoj antropologiaj kontestis...

En 1864 la franca advokato Lartet trovis esplore en la valo de l'Vezère, sub la roka balkono « La Madeleine » eron de mamuta dento en kiun estis gravurita mamuto. Unua signo do, de kunekzistado de homo kaj mamuto !



KAVERNO DE NERJA (Malaga)

Natura formacio de stalagtitoj en formo de kapo kaj piedo de elefanto kiuj estis akcente ruĝpentrumitaj en la praepoko (Magdalenio).



KAVERNO DE LA PILETA (ĉe Ronda, Andaluzia). Fiŝo 1,20 m. longa ; la kaverno nuntempe **situas en tute** senakva **ŝtona dezerto.**

En 1879 la kvarjara filineto de hispana grafo Marcelino de Sautuola ekvidis en kaverno, 280 m. profunda, polikromiajn desegnaĵojn pri bestoj, de pratempoj formortintaj -- ĉu do prahistoriaj, glaciepokaj pentraĵoj ? La sciencistoj forte kontestis — eĉ rifuzis viziti tiun kavernon ĉe Santander : Altamira, kun ĉirkaŭ 150 bildoj — nomante la grafon mensogulo. Kelkajn jarojn poste li mortis, ne rehonorigita. Pasis du jardekoj. Denove oni eltrovis hazarde en 1901 pentraĵojn evidente prahistoriajn, ĉi-foje en Francio, en kavernoj Les Combarelles kaj Font de Gaume.

Nun la mistero fariĝis esplorenda.

La eminenta prahistoriisto Emile Carteilhac, plej forta antagonisto de Altamira, post vizito al tiu kaverno, en respektinda honesteco deklaris oficiale sian konsekvencoplenan eraron en « L'Anthropologie », « La grotte d'Altamira, Mea culpa d'un sceptique » (1902).

Do multvaria, ja aventura estas kaj la historio de la agnosko de « Prahomo » kaj, eĉ pli, de ties arto. Sed per tiu scienca agnosko de ekzisto de arto glaciepoka, nur en nia 20-a jarcento, totale transformiĝis kaj la perceptoj ĉirilataj kaj la ĝenerala sinteno al la historio de l'homaro.

Rilate la arthistorion de la Okcidento ĝis tiam ni ligis ĉiun konsideron kun la tradicia kaj laŭŝajne « pruvita » koncepto ke komenciĝo de la Arto estas difinenda je la epoko de l'Hele-

nismo, ĉirkaŭ 500 jaroj antaŭ nia erao. La arta produktado en Egiptujo, Mezopotamio aŭ Babilonio, pli antikva je jarmiloj kompare al Helenismo, ne ŝajnis havi konkretajn rilatojn al manifestaĵoj de kulturoj aŭ de arto pli postaj en Eŭropo.

Sed la rezultatoj pri la esplorado en glaciepokaj pentrumitaj kavernoj, precipe en tiuj de Hispanio kaj Francio, ne lasas ian dubon : Tiuj bildoj reprezentas la plej mirigajn eltrovaĵojn en nia erao, kiuj peras al ni unikajn informojn pri la vivmaniero de l'homo en la glaciepoko antaŭ ĉirkaŭ 50 000 - 12 000 jaroj. Certe, tiuj ciferoj apartenas al epoko antropologia tiel ege malproksima ke ili superas la imagan kapablecon ; kompare ekzemple al la plej antikvaj konstruaĵoj, ruine konservitaj, la piramidoj egiptaj, tiuj praepokaj ciferoj reprezentas ne malpi ol la dekoblo de ties aĝo.



Mamuto baŭmanta kaj pravirbovo Desegnaĵo prahistoria en la kaverno Pech Merle (Cabrerets) el la epoko malfrua Magdalenio (aĝo ĉ. 15 000 jaroj)

Oni ja eltrovis intertempe grataĵojn kaj gravuraĵojn pri homoj kaj bestoj ankaŭ en aliaj terpartoj, ekzemple en Afriko kaj Aŭstralujo, sed ili datiĝas jarmilojn pli poste rilate al tiuj eŭropaj, el la paleolitiko.

Abundas la menaĝerio desegne aŭ pentre prezentita en ĉirkaŭ 140 kavernoj : mamutoj, bizonoj, rinoceroj, prabovoj kaj ĉevaloj, cervoj ,aproj ,lupoj, kavernoleonoj, fiŝoj, ktp...

Jen la bestoj staras, ripozas aŭ fuĝas antaŭ ĉasisto, jen ili sangas el vundoj, jen flugas lancoj al ili, jen ili mortas... La celo de tiu arta kreado en la glaciepoko ne estis krei « arton pro la arto ». Ĉiuj pentraĵoj utilis por magiaj ritoj : desegne reprodukti bestojn, plej eble perfekte, helpis majstri kaj akiri ilin en ĉesado.

La esplorado de tiuj glaciepokaj pentraĵoj, kreitaj en la krepusko de l'homa estado, apartenas nepre al la plej ekscitigaj ekkonoj de nia jarcento. Montriĝas al ni la homo de antaŭ 20 000, 30 000, ja eĉ 50 000 jaroj, la speco homo kies nura ekzisto arde estis forrifuzita ankoraŭ antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj. Surprize li montriĝas per tiuj postrestaĵoj kiel artisto de eminenta formato - tiel eminenta, ke ne ekzistas io ajn, kiu estus tiusence egalranga en la kulturaj epokoj inter la Magdalenio (10 000 jaroj antaŭ nia eraro ĝis la antikvo.

Hugo Röllinger
Bad Kissingen (F.R.G.)

S-ro Hugo RÖLLINGER, aŭtoro de la artikolo

NASKIĜO DE LA ARTO

prelegos dum la dua periodo de la
somera programo de la Esperantista Kulturdomo :

KULTURAJ KAJ TURISMAJ FERIOJ

Alveno la 25-an de Julio — Foriro la 7-an de Aŭgusto

Programo : Prelegoj, ekskursoj (29-an de Julio kaj 5-an de Aŭgusto)

Aliĝo : Esperantisto Kulturdomo, kastelo Grésillon, 49 - BAUGÉ (Francujo)

LA UNUA MENSONGO

La patrino de Roseta estis granda, dika virino, volonte fanfaronema. Al ĉiu, ŝi rakontis kiel bone ŝi edukis sian filinon. Roseta neniam mensogas. Eĉ en malfacilaj situacioj, ĉiam ŝi diras la veron.

— Tre malbone vi edukis vian filinon ! diris al ŝi, foje, iu saĝulo, — la homoj toleras al infano, se ĝi senindulgeme diras la veron, tamen se ĝi, kreskanta, ne eklernas mensogi, tiam ĝi iĝos malfeliĉa dum sia tuta vivo.

La malbonoj pli frue komenciĝis, ol la saĝulo pensis. En la lernejo, la profesoro pri biontologio plendis al matematik-profesoro : Mi ne povas disciplini tiujn miskondutajn infanojn. Ili solidariĝis kaj neniam denuncias unu la alian. Kion fari ?

— Vi devas demandi nur Rosetan. Ĉiam ŝi diras la veron. Respondis la matematik-profesoro.

Proksimfoje, kun bruega krakado rompiĝis la nuksoŝeloj gluitaj sub la piedoj de la seĝo, kiam la profesoro eksidis. La katedro pli grandigis, eĉ eĥis la inferan bruon. La tuta klaso skuiĝis de ridaĉo.

— Kiu faris tion ? Ekkriis la profesoro... Granda silento.

— Mi demandas kiu metis nuksoŝelojn sub la seĝo ? Ludoviko, ekstaru !

— Mi ne scias, sinjoro profesoro...

— Roseta ekstaru ! Respondu !

Roseta staris, sed silentis.
— Knabino, respondu al mia demando. Kuraĝigis la profesoro.

— Mi ne diros — mallaŭte, sed decideme, respondis la knabino. La lernantaro ekmurmuris, kaj la profesoro ruĝiĝis.

— Kial vi ne diros ?

— Ĉar tiam, denove, ne parolos al mi miaj kunuloj. La klaso komencis dangere muĝi en senkaŝa ribelo. La profesoro meditis. Se li ne disciplinas tiun-ĉi knabinon, pereos lia aŭtoritateco.

— Roseta, venu tien.

La knabino obeeme iris al la profesoro, renkonten al li, kiu prenis la mentonon de la lernantino en sian manon por turni ŝian vizaĝon pli supren. Li pensis, ke lia alteco ektimigos la knabinon tiel devigata rezigni pri obstineco. Roseta vere timis. Ŝia maldika korpo tremis kaj ŝiaj grandaj brunaj okuloj pli bele brilis en la blankpala kadro de ŝia vizaĝo.

— Kiel bela estas tiu-ĉi knabino ! pensis Joĉjo sur la dua benko. Post la instruo, mi elprovos ĉe ŝi mian metodon !

Joĉjo estis maltimema knabo. Li havis agrablan vizaĝon, kaj liaj sukcesoj apud la knabinoj igis lin tro memfidan. Li akiris rutinon en la amindumad-arto, kaj nur malmultaj knabinaj rifuzis la kisetojn de li post aplikado de liaj metodoj.

— Roseta, pripensu grave — diris la profesoro — Iu metis nuksoŝelojn sub mia seĝo. Tio estas malkorekteco, kiu perturbas la lernadon. Tamen ne granda peko, al kiu respondos ne granda puno, sed vi grave pekos se, scianta pri la kulpanto, vi obstine kaŝas la veron kontraŭ mi, kontraŭ la lerneja disciplino. Plej impertinenta vi estas, se vi volas neniigi mian aŭtoritation. Ĉu vi scias kiamaniere mi povas mallaŭdi al tia konduto ?

— Mi ne volas neniigi vian aŭtoritaton, sinjoro profesoro. Sed, se mi diros kiu estas la kulpulo, tiam ĉiuj primokos min kiel denunciantinon.

La profesoro ekprenis la manon de la knabino — Tuj, venu kun mi al la direktoro !

Joĉjo ekkompatis Rosetan, stariĝis, kaj diris : Sinjoro profesoro, mi estas la kulpulo.

La profesoro liberlasis Rosetan, kaj petis la kontrollibreton de Joĉjo.

Dum la paŭzo, Roseta mire demandis Joĉjon : Kial vi surprenis la kulpon ? Ankaŭ vi scias, ke Roberto faris tion.

— Tio estas longa historio. Post la instruo, mi akompanos vin kaj rakontos.

La metodo de Joĉjo denove sukcesis. Tiel ĝi sukcesis, ke Roseta du horojn malfruadis.

— Kien vi estis ? demandis la patrino, kiam la knabino, fine, revenis hejmen.

— Knabino malsaniĝis kaj mankis en la manpilko teamo. Oni petis min anstataŭi ŝin ĉar estis serioza maĉo, respondis ruĝe Roseta.

— Kial vi tiom ruĝiĝas ?

Roseta surpriziĝis, ŝi opiniis ke vere malfacile oni povas mensongi.

— ... Patrino, mi mensogis. Mi babilis kun knabo.

— Kion faris al vi tiu knabo ?

— Nenion. Fine li volis min kisi, sed mi forkuris.

— Mia filino mensogis ! Dank'al Dio vi ne iĝos malfeliĉa.

De nun, vi ne plu estas infano, sed virino. Tamen, vi devos plulerni, ĉar tiu unua mensogo estis tre mallerta !

— Sed la dua bone sukcesis ! pensis Roseta, kiu ĝoje silentis. Ŝi turnis la kapon, malfermis siajn belajn okulojn, kaj ridetis ĉar ŝi rememoris pri la unuaj kisoj.

Ladislav Tihanyi.



La tuta familio legas nian revuon
KULTURAJ KAJEROJ
(listo de la perantoj sur la lasta kovril-paĝo)



POEMOJ DE LUCIAN BLAGA - 1895-1961

El la rumana lingvo : Mikaelo Sokolesku

LA LARMOJ

Kiam, forpelita el la nest' de l' eterneco,
l' unua hom'
pasadis mirigita kaj enpensa tra arbaroj kaj
[tra kampoj,
turmentis lin riproĉadmone
la lum', la horizont', la nuboj — kaj el ĉiu
[floro
trapikis lin per rememor' la paradizo.
Kaj li, l' unua homo, la vagulo, plori ne scipo-
[vis.

Iame, lacigita de la tro serena blu'
de la printempo,
infananima hom' l' unua
ekfalis per vizag' en polvon de la tero :
« Sinjor', senigu min je la vidado
aŭ, se vi povas, la okulojn miajn nebuligu
per tolkovrilo,
por ke mi vidu
nek florojn, nek ĉielon, nek de Eva la ridetojn,
[nek nubojn.
ĉar, vidas vi — ilia lumo min doloras ».
Kaj tiam la Plejalta, dum momento de kompa-
[to,
al li donacis tuj — la larmojn.

LA REVULO

Pendiĝanta sur aer' tra inter branĉoj
sin agitas en retajo sia
araneo.
Lunradio
Vekis lin el dorm'.
Kial li baraktas ? Songis, ke
luradi' fadeno lia estas, kaj
nun li provas supreniri
ĝis ĉielo, alten, sur radio.
Nu, la kuraĝulo baraktadas
kaj sin jetas tien.
Sed mi timas,
ke falanta estos — la revulo.

DONU AL MI KORPON VI MONTOJ

Sole nur vin mi posedas, ho korpo pasema.
kaj tamen
mi ne almetas ornamojn al frunt' kaj hararo
[la viaj,
ĉar via polvo malriĉa
estas mallarĝa por tia anim' grandegula,
loĝanta en mi.

Donu al mi korpon
vi montoj,
maroj,
donu al mi korpon alian, ke mi la frenezon el
[mi disversadu
tutplene !
Tero vastega, vi estu trunko la mia,
estu la brusto de tiu ĉi koro senbrida,
aliformiĝu en ejon de min dispremantaj ven-
[tegoj,
estu amforo de mia memo obstina !

Tra kosmo
tiam aŭdiĝus la paŝoj miaj majestaj
kaj mi aperus impeta, libera,
kia mi estas,
ho tero sankta.

Kiam mi amus,
mi al ĉielo etendus la marojn miajn
Kiel fortikajn, sovaĝajn brakojn varmegajn,
al la ĉielo
por ĝin ĉirkaŭpreni,
por stringi talion la ĝian pasie,
por kisi ĝiajn brilantajn stelojn.

Dum mi malamus,
mi frakasadus sub miaj piedoj ŝtonegaj
sunojn povrajn
migrantajn
kaj eble mi eĉ ekridetus.

Sed, sole nur vin mi posedas, ho korpo pasema.

LA LUNSONATO

La Lunsonato de Beethoven estas
la luno mem sur teron descendinta.
Tiele kredus kaj tiele dirus :
la luno, kiu paŝas tra arbaroj,
sur blua ros' kaj sur liliofloroj,
konsistigadas el amaraj
lumoj kaj el dolĉa vento
Ofelia-jn, Margareta-jn, Beatrica-jn.
El inter tiuj ekmontriĝas ankaŭ ci,
kiel parto de l'Sonato,
kiu estis ludita
ankoraŭ neniam.

LA VERSISTO

Eĉ tiam, kiam verkas mi originalaj versojn,
nenion faras mi ol interpretas.
Mi tiel trovas, ke konvenas.
Nur tiel vers' motivas
la plenumiĝon kaj floradon sian.
Tradukas ĉiam mi. Tradukas
en la rumanan lingvon
la kanton, kiun mia kor'
al mi flustradas dolĉe sialingve.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En la venonta numero aperos la listo de la gajnintoj, kiuj estos persone informitaj tuj post la fina juĝado fare de la konkurso-komisiono. Ankaŭ en nia venonta numero aperos la unuaj provoj de nova konkurso.

AMUZAJ PROBLEMOJ


— **SOLVO DE LA PROBLEMOJ APERINTA EN LA ANTAŬA NUMERO**

OVO-KOLEKTADO

Oni povas dividi la nombron 1 079 per 13 kaj 83. La kapitano ne havis sufiĉe da tempo por viziti 83 farmojn. Tial la nombro da farmoj estis 13, kaj la kapitano devis peti 83 ovojn en ĉiu farmo.

— **NOVAJ PROBLEMOJ**

KRUCVORTOJ



(r) = nur radikalo

HORIZONTALE. — 1. Metodo de kuracado per radioj (r). — 2. Eliĝi nevideble (r) ; iom post iom forigi el la korpo malutilajn substancojn (r). — 3. Fatalo (r) ; podio por oratoro. — 4. Greka fabelisto ; aserto elmetata kaj defendata de iu persono. — 5. Nomo de litero ; kurba, elstara tenilo por preni, porti, tiri, ktp (r) ; fiksu, ĉirkaŭvolvu per ŝnuro, ĉeno aŭ alia rimeno. — 6. Iri internen de iu loko (r) ; havi inklinon por iu ; prepozicio. — 7. Tempo dum kiu la suno ne lumigas al ni ; nedifinita pronomo. — 8. Ne povi ne fari ion pro ia praktika bezono, morala leĝo, ktp (r) ; konfirmi internacian traktaton. — 9. Profite uzebla ; grasa fluaĵo (r). — 10. Homo, kies profesio estas mortigi per spado virbovon en batalludoj (r) ; mordeti, manĝi per malgrandaj pecoj (r). — 11. Sufikso ; streĉa kunliganta interplektajo (r) ; plata malbonodora insekto kiu pikvundas la homojn.

VERTIKALE. — 1. Voĉdonado de tuta popolo por akcepti aŭ malakcepti iun leĝdonan projekton. — 2. Amerika rivegero (r) ; loko, kie militista trupo aŭ vojaĝantoj haltas por pasigi la nokton (r). — 3. Preciza tempo de ia okazajo ; afable peti iun, ke li ien venu (r). — 4. Sufikso ; aro de du samspecaj estuloj ; hararo kovranta la korpon de ŝafoj (r). — 5. Muzika sono (r) ; aro da lignaj aŭ feraj stangoj servanta kiel forta barilo. — 6. Planedo, sur kiu ni loĝas (r) ; tiu, kies manĝobezono aŭ deziro estas kontentigita ; lirika poemo (r). — 7. Plej bona parto el aro (r) ; maŝino, per kiu iu forto povas produkti movon (r). — 8. Rifuzi obeon al aŭtoritato ; sufikso. — 9. Agrable kaj ĝojige distri ; disponigi al iu ion ne petitan. — 10. Konifera arbo (r) ; fabela estajo, feo, koboldo (r) ; unuo de elektra rezistanco (r). — 11. Enkonduki en iun vivantan organismon la mikrobon de iu infekta malsano ; sufikso.

KURIOZA MANIERO VOJAĜI :

Du personoj havas nur unu biciklon por iri de A ĝis B. AB = 20 km. Ili foriras de A samtempe la unua bicikle ĝis punkto C inter A kaj B je rapido de 15 km./h. ; la dua piede je rapido de 4 km./h. Kiam la unua persono atingas la punkton C, li metas la biciklon sur la bordo de la vojo kaj daŭrigas la iradon piede je rapido de 5 km./h. La dua persono trovas la biciklon, ekrajdas ĝin kaj finas la vojiradon je rapido de 12 km./h. La du personoj alvenas en B samtempe.

Kalkulu la distancon A C.

VORTO ĈENO :

Helpe de la sekvantaj difinoj, trovu 15 trisilabajn vortojn kiuj devos formi ĉenon tiamaniere, ke ĉiu vorto komenciĝu per la meza silabo de la antaŭa vorto, kaj la unua silabo de la unua vorto komenciĝu per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri duliteraj silaboj.

Difinoj. — 1) samokupulo. — 2) kuniklego. — 3) kontrakto pri asekuro. — 4) kriptogama vegetajo. — 5) ĉarma infaneto. — 6) sovaĝa arbeto. — 7) el lakta kremo. — 8) alta vira voĉo. — 9) migranta homo aŭ popolo. — 10) difekta punkto. — 11) multuza bileto. — 12) ekstremoj de sferakso. — 13) koleoptero. — 14) legomo. — 15) sinonimo je baroko.

GRAMATIKO PER BONHUMORO


AJN : adverba esprimo, insistas pri nedifiniteco, kaj akompanas rilatajn pronomojn, nedifinitajn pronomojn aù adjektivojn.



— Tre estimataj kolegoj, kiam ajn oni petas de mi ne preparitan prelegon...



— Mia edzo uzas decajn vortojn en ĉiuj ajn cirkonstancoj !...



— Ĉu iu ajn en la salono scipovas funkciigi kinoaparaton ?

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).
Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis **septembro** ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément aux n° 3-4 de 1971, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Les travaux prévus par notre Conseil d'administration sont en cours. Une chambre est en voie de complète réfection. Nous l'avons voulue moderne et confortable et nous pensons qu'elle pourra servir d'exemple pour toutes les autres réfections prévues. Trois nouvelles chambres seront pourvues d'eau chaude et une canalisation est amenée au second étage pour une extension future. L'installation de l'électricité dans la cuisine va être refaite et il nous faudra prévoir pour les deux années à venir le changement complet de l'alimentation électrique, celle-ci n'étant plus adaptée. Nous avons passé commande d'une nouvelle armoire frigorifique de 1.500 litres qui nous permettra le stockage de produits, ce qui nous était jusqu'alors impossible. L'ancienne armoire trop petite, nous a causé beaucoup d'ennuis l'été dernier et à Pâques car elle n'a plus de frigorifique que le nom. Cela nous a amené à prendre une décision que nous n'avions pas pensé aussi urgente.

Voilà bien des dépenses en vue. Le succès des semaines de Pâques, celui qui s'annonce pour cet été, sauf pour la deuxième période qui offre encore bien des places libres, nous ont permis de les engager. Nous pensons que tous nos amis apprécieront ces nouveaux aménagements qui, nous l'espérons, seront suivis de beaucoup d'autres.

Notre Conseil d'administration avait également décidé de proposer aux amis qui, aux premières heures de la M.C.E. avaient mis à notre disposition des prêts inférieurs à 100,00 Fr., soit de leur rembourser leur prêt, soit de le transformer en part de sociétaire, soit de le transformer en don. A notre circulaire une petite partie des intéressés seulement a répondu et nous les en remercions. Nous espérons que les autres vont nous faire part de leur décision très vite. Quelques circulaires nous sont revenues n'ayant pas atteint leurs destinataires. Peut être certains d'entre vous connaissent-ils les adresses actuelles de : Mlle P. Clairotte (Champvan), Mlle Hennequin (Le Mans), Mlle J. Saurin (Nice), M. R. Canet (Auxerre), M. Lesage (St-Quentin), M. R. Maucour (Mouliherne). Nous serions très reconnaissants à ceux qui pourraient nous aider.

Et n'oubliez pas que vous pouvez toujours devenir sociétaires de notre M.C.E. ou augmenter le nombre de vos parts. Nous sommes à votre disposition pour tous les renseignements que vous désirez recevoir.

R. BABIN.

LA REVUE

Depuis trois mois, « Kulturaj Kajeroj » a enregistré un certain nombre de nouveaux abonnements. Des universités étrangères nous ont demandé le service de la revue pour leurs étudiants. Tout cela est très encourageant et nous incite à faire mieux. Cela sera possible avec votre aide. Que les retardataires règlent rapidement leur abonnement. Que tous nos amis fassent un effort de propagande autour d'eux et abonnent leurs correspondants et nous pourrons encore améliorer le contenu et la présentation.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS 1971
(suite)

M. Coulou (25)	15,00
S-ro Futran (U.S.A.)	15,00
Mme Jurquet (83)	15,00
M. Linhart (49)	15,00
M. Selle (75)	15,00
S-ro Jakubec (Tchéc.)	15,00
S-ro Seidler (Tchéc.)	15,00
S-ro Usui (Mex.)	15,00
S-ro Macuda (Japon)	15,00
M. Miguel (18)	15,00
Mme Amariglio (92)	15,00
M. Despiney (94)	15,00
Mme Askolovitch (75)	15,00
S-ro Schutt (Al. Féd.)	30,00
M. Fourcade (45)	15,00
M. Trépied (74)	25,00
M. Grampp (67)	15,00
M. Cuène (67)	15,00
S-ro Brescha (Tchéc.)	25,00
Mme Bossuet (33)	20,00
Mme Chaillou (17)	15,00
M. Prévot (44)	30,00
M. Ringotte (59)	15,00
M. Stutzmann (68)	15,00
M. Fresneau (35)	15,00
M. Mélo (42)	20,00
M. Lherbier (72)	15,00
M. Wattier (92)	15,00
M. Vihelm (59)	15,00
Total	*395,00*

NOS JOIES

Françoise Lenel va devenir, le 4 juillet, Mme Jean-Michel Leriche. Tous les amis qui ont pu apprécier l'entrain et le dévouement de Françoise aux cours des nombreux stages auxquels elle a participé activement, se réjouiront avec nous de cette nouvelle. Le Conseil d'administration adresse à Françoise et à Jean-Michel tous ses vœux de bonheur.

Mlle Odette Albault a épousé le 12 juin 1971 M. Henri Zazurka. La M.C.E. est heureuse de féliciter les nouveaux époux.

Au foyer de Alain Guillot, fils de nos amis Guillot de Annemasse, vient de naître Matthieu. Félicitations aux parents, aux grands-parents et tous nos vœux à Matthieu.

PHILATELISTES

Nous tenons toujours à votre disposition des séries neuves de timbres de Roumanie et de Pologne. Vous pouvez faire une économie de 50 % sur le prix des catalogues spécialisés en envoyant un chèque de 10, 20, 30, 50 francs à : M. Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - Croix ; C.C.P. Lille 2 269 89. Ces timbres nous sont envoyés en réglement d'abonnements.

SUCCES AUX EXAMENS

Atesto pri Supera lernado :

Plutniak Arlette, Plutniak Edmond, Monnier Germaine, Ballandras Michel, Picard Marie-Claude, Coulon Henri, Coulon Marcelle, Pointin, Boissou, Cotton Armand, Cotton Yvonne, Morin Daniel.

Atesto pri lernado :

Morin Daniel, Morin Paule, Trigalot Monique, Besançon A., Plantiveau Huguette, Gauthier Christian, Cotton Huguette, Cotton Armand, Rosemann Heide, Grinouin Jocelyne, Granero Nadine, Boissou, Pointin.

Félicitations à tous.

PROGRAMME ÉTÉ 1971

Première période

Arrivée le 4 juillet — Départ le 25 juillet

Semaines Culturelles et Espérantistes

Cours pour débutants — Cours pratique — Cours supérieur.
Préparation aux différents examens.
Reliure, vannerie, émaux.

Deuxième période

Arrivée le 25 juillet — Départ le 7 août

Quinzaine Internationale

Conférences — Excursions : connaissance du Val de Loire

Chaque jour : 10 h. - 12 h. : Conférences.
17 h. - 19 h. : Conversation guidée.
21 heures : Distractions diverses.

Excursions le 29 juillet et le 5 août.

Troisième période

Arrivée le 7 août — Départ le 14 août

Postkongreso de S.A.T.

(après le congrès de Paris)

Quatrième période

Arrivée le 15 août — Départ le 4 septembre

Semaines d'Etude

Cours pour débutants — Cours pratique — Cours supérieur.
Préparation aux différents examens.
Reliure, vannerie, émaux.

Excursions possibles : Châteaux de la Loire, Angers, Le Mans, La Flèche, Nantes, Le Lude.

Il est recommandé de retenir sa chambre longtemps à l'avance.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	28,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.